



# PILO-PRESS

Internacia  
Informservo  
=====

Jara abono

30, -- GM

P&K Nürnberg  
819 56 - 051  
-----

Eldanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 39/1975 4 nov 1975  
Aperas ĉiusemajne  
=====

Salutoj al Pilo-Press de  
ministeria delegacio

Paderborn. En Paderborn momente restadas 5-persona delegacio de la kultura ministerio de Okcidenta Berlino. Ili ne nur vizitis la FEOLL-instituton de prof. d-ro Frank, sed partoprenis ankaŭ Esperanto-kurson en elementa lernejo. Pilo-Press ricevis ilustritan salutkarton, kiujn subskribis:

Walter Rasch, F.D.P., senatano por lernejoj aferoj en Berlino

Ingrid Schacht, F.D.P. senata direktorino en la Senato de Berlino

Dr. Leonhard Stroux, F.D.P. pedagogia referento de la lerneja senatano

Gerhard Weil, persona referento de la lerneja senatano, F.D.P.

Krome la salutkarton el la Esperanto-restoracio "Bareleto" subskribis: Horst Jenczyk, Helmar Frank, G. Lobin, Brigitte S. Meder, H.J. v. Donop, Hermann Behrmann.

## Granda Zamenhof-Festo en Paderborn

Paderborn (pp) - La Societo pri lingvolimtranspaŝa eŭropa interkompreniĝo (Eŭropa Klubo) okazigos Zamenhofan feston ĉam sabato, la 20-an de decembro 1975, 15 - 18 horo, en la granda salono de la restoracio "Bürgerverein" en Paderborn, FRG, strato am Liboriberg. Invititaj estas ĉefe la elementlernejaj Esperanto-lernantoj kaj ties gepatroj, sed ankaŭ esperantistoj de proksime kaj malproksime. Festoprelegoj prof. d-rp Frank, kantas diversaj infanaj grupoj, montros filmojn Drago Smolić. - Ĉar la salono nur havas lokon por 130 personoj, skriba anonco de partoprenemuloj nepre necesas. Oni skribu al la prezidanto de la Eŭropa Klubo, Hermann Behrmann, 479 Paderborn, Riemekestr. 62, FRG.



PILO-PRESS  
S-ro Ludwig Pickel  
85 Nürnberg 1  
Postfach 2113

EL la BARELETO  
sendas korajn salutojn  
Velle kien F.D.P.

Ingrid (Wald) F.D.P.  
Walter Rasch F.D.P.  
Gerhard Weil F.D.P.  
Horst Jenczyk  
Helmar Frank  
G. Lobin  
Brigitte S. Meder  
H.J. v. Donop  
Hermann Behrmann

WOLFGANG UHNER, HANS KLOCKE, UHNER, PADERBORN

La Internacia Jaro de la virino kaj Esperanto

---

Hamburg (pp) - S-ino Elsbeth Bormann, konisistino de UEA por la Internacia Jaro de la Virino, dissendis al la kunlaborantoj agadplanon, kiu samtenpe estu diskutbazo por la finraporto pri la partopreno de la organizita Esperanto-movado en la Internacia Virina Jaro. La agadplano tekstas:

- 1 Trilaborado de la ĝenerala temo (atentigo pri kontraŭvirina diskriminacio, veko de konscienco mondvasse, plibonigoj de la situacio) inter la geesperantistoj.
- 11 Laborado en la komisiono de UEA por korespondado kaj dum kunsidoj (ekz. dum la UK en Kopenhago).
- 12 Koresponda interkonsiliĝo inter esperantistinoj pri virinaj temoj.
- 13 Helpe al virinoj per Esperanto, ĉefe al esperantistinoj en diskriminaciita stato.
- 14 Diskutado pri konstanteco en la plenumado de la taskoj per ebla fonda de aparta virina Esperanto-asocio.
- 2 Regiona kaj loka laboro de la Esperanto-movado partoprenante la Internacian Jaron de la Virino.
- 21 Prelegoj kaj diskutoj pri virinaj temoj dum kunvenoj de lokaj Esperanto-societoj aŭ regionaj konferencoj.
- 22 Partopreno en ĝeneralaj aranĝaĵoj kiel ekspozicioj, diskutkunvenoj, demonstracioj funkciigitaj de neesperantistaj instancoj.
- 23 Publikigaĵoj pri virinaj aferoj en esperantistaj organoj, informiloj kaj internaj bultenoj.
- 3 Partopreno en neesperantistaj kongresoj aŭ konferencoj pro la Internacia Jaro de la Virino.
- 31 Tutmondaj konferencoj oficialaj de UN (Meksikurbo) aŭ de UNESKO.
- 32 Internaciaj neoficialaj konferencoj.
- 33 Grandaj konferencoj en la unuopaj ŝtatoj kun internacia signifo.
- 4 Rekta kontaktado al virinmovadaj kaj politikaj instancoj.
- 41 Kontakto kun organizaĵoj de virinoj (ekz. dum la UK en Kopenhago kun reprezentantinoj de la dana virinmovado) por reciproka plifortigo.
- 42 Influo sur politikistojn de esperantistinoj por sukcesigi la Internacian Jaron de la Virino.
- 5 Uzo de esperantistaj kongresoj kaj konferencoj por atentigi pri la Internacia Jaro de la Virino kaj kontribui al ĝia aranĝaro.
- 51 Virintemaj kunsidoj dum la UK kaj elstarigo de virinoj.
- 52 Internacia konferenco pri la pozicio de la virino kun Esperanto kiel laborlingvo (povus esti).
- 53 Elstarigo de la temo de la Internacia Jaro de la Virino dum kongresoj de landaj asocioj aŭ similaj aranĝaĵoj.
- 6 Atentigo en publikigaj medioj ligantaj la temojn Esperanto kaj Internacia Jaro de la Virino.
- 61 Temo Internacia Jaro de la Virino en esperantlingvaj revuoj.
- 62 Mencioj de la Internacia Jaro de la Virino pro klopodoj de esperantistinoj en nacilingvaj gazetoj, revuoj kaj elsendaĵoj de radio kaj televido.

- 7 Movadinternaj aktivecoj favore al virinoj.
- 71 Favorigo por virinoj kiel funkciuloj en la Esperanto-movado.
- 72 Statistikaj kaj historiaj esploraĵoj pri la kontribuo de virinoj en la Esperanto-movado.
- 73 Roluo de la lingvaĵoj konsideranta la ĉirkaŭon de multaj virinoj.

En la akompana letero s-rino Bormann petas pri elsendo de malgranda raporto pri la faritaj aktivecoj lige kun la Internacia Jaro de la Virino. Ĝia la letero bona okazo por prelego pri virina temo estos la Gemenhof-festoj.

### Dumvintre en Bona Espero

Heidelberg (pp) - Karl Link, estro de la Esperantogrupa Heidelberg,flugos vendrede, la 7-an de novembro, al Brasilia, por pasigi la vintron en la Esperanto-kooperativo "Bona Espero", kie li estos gastoj ĉe ges-roj Grattapaglia.

Pri Bona Espero ni eksciis novaĵojn el letero de ges-roj Grattapaglia al Karl Link de la 17-a de oktobro 1975. Ni legas en ĝi:

"Via ŝatata letero de la 8-a de oktobro atingis tre rapide kaj feliĉe kaj tute hazarde ni estis en Brasilia kiam ĝi alvenis. Ja, morgaŭ ni aranĝos en urbo Goiania grandan Festivalon en urba parko por 5 000 infanoj, kun muziko, ludoj ktp. Temos pri grandioza infana festo, kiu ebligos al ni bonege informadi pri Esperanto (ni havos ekspozician standon kun vendado de Esperanto-libroj), kaj krome parto de la profito de tiu festivalo apartenos al Bona Espero por daŭrigi tie la konstruadon de ponto kaj plibonigadon de la domoj.

Survoje al la urbo Goiania ni trapasis Brazilion kaj ni vere ĝojas ke ni povis legi la informon de via baldaŭa alveno. Vi estas la unua, kiu akceptis tiel frue nian inviton.

Ni atendos vin en la flughaveno de Brasilia sabatonmatene, la 8-an de novembro. Tie vi povos ripozi iomete kaj la postan matenon ni alfrontos la lastajn 250 kilometrojn per nia Kombi Volkswagen tra la sovaĝejo de interna Brazilio."

### Kurt Schönrich 90-jara

Wiesbaden (pp) La 90-an datrevenon de sia naskiĝo festas la 4-an de novembro Kurt Schönrich (62 Wiesbaden, Hallgarter Str. 10). Kurt Schönrich estas longjara aktiva esperantisto, ankoraŭ nun la funkcias kiel prezidanto de la Esperantogrupa Wiesbaden, kiun li gvidas de post ĝia refondo post la milito. En antaŭaj jaroj li estis tre aktiva ankaŭ en instruista medio, speciale en Heslando.

Pilo-Press kore gratulas kaj deziras ĉion bonan por la venontaj jaroj.

### UEA-Delegito de Tokio en Eŭropo

Nürnberg (pp) - Prof. Taro Niŝiumi, UEA-delegito de Tokio, nuntempe restadas en Eŭropo. La 12-an de oktobro li alvenis en Taŝkento, kie li renkontis kun la tiea delegito Petro Poliŝtuk. Post restadoj en Moskvo, Leningrado, Kievo, Bukareŝto, Beogrado, Budapeŝto, Vieno kaj Prago, kie li ĉiam havis kontaktojn kun esperantistoj, li alvenis la 3-an de novembro en Nürnberg, kie li estis akceptita de la Pilo-Press-eldonanto Ludwig Pickel. Liaj venontaj vojaĝceloj estas Parizo kaj Hispanio. Nuntempe li estas ĉe ges-roj Kleemann en Muggensturm.

\*\*\*\*\*

### Atentigo

Bonvolu atenti la anoncon pri la nova konkurso de Pola Radio!

Konkurso de POLA RADIO

10-tagaĵ ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

- 1) Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo.
- 2) Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?
- 3) Kiujn virinojn vi konas, kiuj - laŭ via opinio - ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro 1975 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO  
Warszawa